Stefano Csurgaj, parlamenta deputito, vic-prezidanto de HES, laboras energie por Esperanto. Li sukcesis vojaĝi komence de septembro al la Nederlanda Esperanto-Kongreso en Utrecht. En Nederlando li traktadis inter aliaj kun Esperanto-amikoj kaj politikistoj. S-ano Csurgai estas la unua hungaro, kiu post la militfino, kiel Esperantisto vojaĝis al eksterlando kaj gravega cirkonstanco estas, ke lia vojaĝo okazis pere de registara subteno.

AL LA SVEDAJ GEESPERANTISTOJ.

En la nomo de la Nederlandaj Geesperantistoj ni tre dankas ĉiujn gekunlaborantojn, kiuj, pere de la Sveda-Holanda Helpkomitato en Göteborg sendis vestojn al Nederlando en la komenco de la jaro 1946a.
Entute ni ricevis pli ol 2000 kg. da vestoj kaj el ĉiuj partoj de nia lando ni ricevis leterojn, ke oni estis tre ĝoja. Ĉiu promesis rekte sendi dankleteron al la donacinto.
Aparte ni certe devas danki la komitatanojn en Göteborg, al kiuj ni sendis Delftan kahelon kiel memorajon. Estis la sekvontaj geamikoj: La geedzoj *Adamson* kaj filino *Inga Maj*, la prezidanto kaj sekretariino, k-do *Andersson* la kasisto de la komitato, s-rino *Titti Rosell*, kiu gvidis rondeton por kudri vestojn por novnaskitaj infanoj. Plue ni aparte volas danki k-don *Gunnar Spant*, amerikan ŝipanon, kiu estis en Svedio kaj tie aŭdis pri la helpagado. Tuj kiam li revenis hejme, li ankaŭ preparis paketon kaj sendis ĝin al Amsterdamo. Fine k-do *Mooi*, direktisto sur nederlanda ŝipo, multe plifaciligis la sendadon.
Estis vere internacia helpagado.
A. M. Mes—Goossen, R'dam.
B. Bultemyer, A'dam.

ESPERANTO EN LA PRAKTIKO.

Por pruvi, ke Esperanto estas tre valora kaj utila en la praktiko, ankaŭ kiam temas pri la gazetaro, ni starigis danan-esperantan gazetaro-oficejon. Ni serĉas artikolojn el ĉiuj landoj (pri ekonomio, komerco, scienco, arto, politiko, kulturo, junularo, turismo ktp.), aktualajn raportojn (pri elektado, gravaj festajoj, kongresoj, naturkatastrofoj ktp.), priskribojn (pri regionoj, urboj, naturo, moroj k.s.), biografiojn de konataj homoj, tradukitajn aŭ originalajn literaturajojn (noveloj, poemoj, humorajoj k.s.). Ni prizorgas la tradukadon el Esperanto kaj sendas la manuskriptojn al ĉiutagaj gazetoj, fakaj ĵurnaloj aŭ semajnaj revuoj. Ni ankaŭ bezonas fotografajojn el ĉiu mondparto.
Ĵurnalistoj, verkistoj kaj aliaj Esperantistoj, kiuj volas liveri materialon, bonvolu skribi al ni kaj ni donas al vi ĉiujn informojn.
Adreso: Redaktoro Rich. G. Nielsen, Herlufmagle, Sjælland, Danlando.

KONKURSO.

Bonvolu partopreni nian konkurson!
Via Tasko: skribu al nia radiostacio:
1. Kion vi opinias pri Ĉeĥoslovakio?
2. Kio vin interesas el la nova vivo en la Ĉeĥoslovaka respubiko?
Interesajn leterojn ni publikigos en ĉeĥa gazetaro. Ĉiu samideano, kies letero estos publikigita ricevos ekzempleron de la gazeto kun sia artikolo kaj Esperantan libron. Sed ni petas, skribu tute sincere!
La respondoj ne devas esti longaj. Sufiĉas kelke da koncizaj, sinceraj frazoj. Pruvu tiamaniere praktikan uzeblecon de Esperanto!
Ni jam antaŭe al vi dankas kaj esperas baldaŭ ricevi vian ŝatatan leteron aŭ poŝtkarton.
Sciigojn pri aŭdebleco de nia radiostacio kaj respondojn je nia konkurso bonvolu sendi al la adreso: Radiostacio Ostrava, Ĉeĥoslovakio.

INSTRUISTOJ ATENTU!

La franca progresema edukmovado „Presarto en lernejo" havas Korespond-Servon, kiu celas praktikigi Esperanton al infanoj, eĉ se ili ankoraŭ ne konas la lingvon. Ĝi planis simplan metodon kiu postulas malmulte da peno. El via kunlaborado, povas rezulti multe por nia lingvo. Nepre petu informojn al: Lentaigne, Balaruc-les-Bains (Hérault) Francio.

KORESPONDADO KUN GERMANOJ.

Mi dankas pro la amasa respondo al mia alvoko en L.E. de Okt. '46. Ili ĝojigis la multnombrajn germanajn esperantistojn, kiuj post tiom da silento, sopiris al nova mondkontakto. Mi transdonis ĉiujn leterojn. Baldaŭ venos rekta respondo ĉar nun tio estas permesata. Vi estu iom paciencaj. Klodja.

PRI PIONIRO.

Kun emocio mi legis „Laborista Esperantisto" la varmajn simpatiajn vortojn, dediĉitajn al mia 40-jara Esperantista jubileo. Efektive la dato 17 Oktobro 1906, kiam aperis mia unua propaganda artikolo en la tiama „Volksdagblad", estas la komenco de mia Esperanto-propagando.
Kvankam mi jam dum longa tempo ne plu portopreņas aktive en la organizado kaj movado — miloj da pli junaj fortoj, feliĉe, sekvis kaj daŭrigis — mi preterlasas nenian okazon pledi por Esperanto. Mi tion faras speciale en mia internacia kontakto sur ekumena [1]) tereno.
Antaŭ ol mi festos mian 50-jaran jubileon (almenaŭ mi esperas ĝisvivi ĝin!) mi esperas, ke la en la N.G.K.E. kunigitaj kvar landaj societoj, efektivigos du gravajn al mi karajn planojn: 1e starigo de monumento sur la tombo de nia Nederlanda pioniro Dreves Uitterdijk (honorŝuldo, geamikoj!); 2e Kreo de nacia Esperanto-centro (muzeo k.t.p.).
Via malnova J. L. Bruijn.

[1]) Ekumena = rilatante al la eklezioj de la mondo entute.

⋆ VAN OVERAL ⋆

Officiële steun in Bulgarije

De Esperantobeweging in Bulgarije breidt zich uit. Vorig jaar telde men daar 30 afdelingen. Thans 56. In 272 plaatsen wonen algemene leden, nog niet voldoende om een afdeling op te richten. Het aantal leden bedraagt thans 1072. In Sofia alleen reeds 250. Het Ministerie van Voorlichting geeft een susidie aan het esperanto-orgaan „Internacia Kulturo" van 100.000 leva's en 4 maanden kosteloze levering van papier, benevens gratis bruikleen van cliché's.

De Bulgaarse regering weet dus de internationale voorlichting door Esperanto te waarderen. De regering gaf eveneens een subsidie van 100.000 leva's ter dekking van de kosten van het Bulgaarse Esperanto-congres.

Het Nationale Comité van Bulgaarse Coöperaties steunde met 50.000 leva's. De Vakvereniging van spoorwegpersoneel en zeelieden, evenals die van het P.T.T.-personeel elk met 30.000 leva's voor de verzorging van de uitgave van een „Interligilo" voor genoemde groepen.

Radio Sofia verdubbelde de Esp.uitzendingen en betaalt thans de radiosprekers. Ook Varna zendt Esp. uit. Aangezien de drukkosten in Bulgarije te hoog werden nam de Bulg. Esp. Asocio deel in de stichting van een eigen drukkerij. Ter vergelijking der betekenis van voormelde subsidies t.o.v. de inlandse waarde van de Leva, diene dat men in de stichting dezer drukkerij 400.000 leva's bijdroeg, een abonnement op „Int. Kultura" voor 16 nummers van 16 pag. 500 leva kost en voor de stichting van een fonds men bijdragen vermeld ziet van 50 en 100 leva.

BUENOS AIRES.

Voor de laatste cursussen werden meer dan 100 deelnemers ingeschreven en voor de schriftelijke cursus 90.

ROEMENIE.

De Esperantobeweging leeft weer op en thans verscheen haar orgaan gedrukt n.l. Informa Bulteno, adres: Str. Atena No. 1, Casuta Postala No. 9, Bukureŝti, Rumanio.

In Oradea Mare leidde de onderburgemeester o.m. een cursus in het stadhuis. In deze plaats vindt men een L.L. Zamenhofstraat en een Esperantostraat.

In Arad cursussen voor de soc.dem. partij, de vakbeweging, de Handelskamer en het Industriële Lyceum, met steun van den directeur van het Lyceum en 2 professoren, alle drie nieuwe esperantisten.

In Brasov cursussen met 40 deelnemers grotendeels intellectuelen: professoren, ambtenaren etc.

Uit verschillende andere plaatsen meldt men grote activiteit. Een arbeiders-esp.groep (Lab. Esp. Grupo G.E.M.) heeft haar adres in Bukarest; Str. Calomfirescu No. 8 (Camera de Munca).

OPINIO DE DRO ZAMENHOF

pri la uzado de Esperanto en naciaj kunvenoj. Ĉe la solena malfermo de la Prepara konferenco de Ruslandaj Esperantistoj en St. Petersburg en 1910 faris D-ro Zamenhof jenan paroladon:

Estimataj sinjorinoj kaj sinjoroj! — Vi eble miros, ke mi parolas al vi ne ruse, sed esperante; vi eble diros, ke ĉar ni nun havas kongreson de samregnanoj kaj ĉiuj, aŭ almenaŭ preskaŭ ĉiuj partoprenantoj komprenas tre bone la saman lingvon, estas multe pli nature paroli al ili en tiu lingvo. Ekzistas tamen gravaj kaŭzoj, pro kiuj mi elektis por mia parolado tiun lingvon, por kiu ni batalas kaj por kiu ni kunvenis.

Niaj kongresoj, ne sole la universalaj, sed ankaŭ la naciaj, havas antaŭ ĉio signifon instruan kaj edukan. Esperantistoj, disjetitaj en diversaj urboj kaj urbetoj, kunvenas en pli aŭ malpli granda amaso, por aŭdi nian lingvon, por kontroli, ĉu ili ĝuste ellernis la lingvon, ĉu ili bone ĝin komprenas, por kompari sian propran manieron de parolado kun la parolmaniero de pli spertaj esperantistoj. Kiam ili poste revenas hejmen, ili ne sole mem parolas pli pure, sed ili alportas modelon de bona parolado al tiuj, kiuj restis hejme. Tiamaniere la kongresoj reguligas la uzadon de la lingvo, kaj dank' al niaj kongresoj jam nun oni parolas Esperanton perfekte egale, ne sole en la plej malproksimaj de ĉiu aparta regno, sed en ĉiuj plej malsamaj lokoj de la tuta tera globo. Jam nun, kiam oni aŭdas bonan kaj spertan esperantan oratoron, oni neniel povas diveni, al kiu nacio aŭ lando li apartenas. La plena aŭtonomia vivo de nia lingvo, kun ĝia absolute propra, ne pruntita kaj ne imitita spirito, ĉiam pli kaj pli fortikiĝas tiamaniere, kvazaŭ ĉiuj esperantistoj de la mondo loĝus kune sur unu malgranda peco da tero.

Ne malpli grava estas la eduka signifo de la esperantistaj kongresoj. Izolitaj esperantistoj, kiuj neniam havis la eblon praktike apliki tion kion ili lernis, ofte dubas, ĉu efektive per Esperanto oni povas tute bone interkompreniĝi. Eĉ interne de la esperantistaj grupoj oni ofte ne kuraĝas paroli esperante, oni balbutas, oni preferas paroli en sia nacia lingvo, kaj proporcie al la nekuraĝeco de la parolado aperos ankaŭ nekuraĝeco de propagando, ĉar la esperantistoj-balbutantoj malgraŭvole ne povas liberigi sin de la timo, ke eble tamen Esperanto estas afero pli teoria, ol praktika. Sed kiam la balbutanto venas al kongreso, kie li havas la eblon aŭdi bonajn kaj spertajn esperantistajn oratorojn, kiam li per siaj propraj oreloj kaj okuloj konvinkiĝas, kiel bele kaj flue oni povus paroli en Esperanto, li entuziasmiĝas, li vidas, ke li laboras por io viva kaj vivoplena, li revenas hejmen kun nova kuraĝo kaj energio. Niaj kongresoj, ne sole la universalaj, sed ankaŭ la lokaj, tiamaniere edukas konvinkitajn, sekve entuziasmajn batalantojn por nia afero.

Tio estas la ĉefaj motivoj, pro kiuj ni en ciuj niaj kongresoj, ne sole en la niversalaj, sed ankaŭ en la naciaj kaj regionaj, nepre devas paroli ne sole pri Esperanto, sed ankaŭ per *Esperanto.*

*

Sekve de nia art. „SAT en de nationale talen" en L. E. de Dec. '46 atentigis nin k-do J. Bout, el Rotterdam, pri ĉi supra parto el parolado de Zamenhof, kiun oni trovas en la „Originala Verkaro" sur paĝo 401.

KONSILO AL KURSGVIDANTOJ.

Ĉiujare granda nombro da kursanoj perdiĝas. Se tio signifus perdon nur de la koncernaj ĉesantoj, la malutilo estus nur relativa. Ankaŭ tiukaze la problemo postulas nian plenan atenton. Sed la afero estas pli danĝera, ĉar tiuj ĉesintoj formas aron de malpropagandantoj. Mi ne volas diri, ke ili faras propagandon kontraŭ Esperanto: tio ne okazas. Sed la fakto mem de ilia ĉeso, de ilia Esperanto-gustinta neesperantismo, havas gravan influon ĉe la neesperantistoj. Tiu influo estas en la plej multaj okazoj malutila kaj la rezulto estas do, ke ni kulturas dum niaj kursoj elementojn malfavorajn al Esperanto.

Nepre necesas, ke ni ankoraŭ pli intense pristudu la problemon pri la gardo de niaj kursanoj. Por klare vidi la problemon necesas sin demandi „kial oni lernas Esperanton?" Kaj la respondo estas, ke la plejmulto ĝin lernas pro ĝia utilo. Nur malmultaj komencas kaj daŭrigas la studadon pro tio, ĉar Esperanto, jam estas ilia idealo (kaj certe ne ilia plej grava idealo). Same malmultaj estas tiuj, kiuj estas konvinkitaj, ke ilia socialisma idealo ne realiĝos sen la lernado kaj uzado de Esperanto. Kaj tre malgranda estas la nombro da tiuj, kiuj studas la lingvon, ĉar ili ŝatas la studadon mem de lingvoj; tiuj kelkaj personoj kompreneble ne ĉesas sian studion.

Se do oni ĝenerale lernas Esperanton pro ĝia utilo, la entuziasmo de la kursanoj malgrandiĝos dum la kurso, se ili ne vidas la eblojn utiligi la lingvon por siaj aspiroj. Tiu senentuziasmiĝo povas atingi tiel altan gradon, ke ili ne ŝatas daŭrigi. Evidentiĝas la peza respondeco de la kursgvidanto, kiu ne nur devas funde scipovi la lingvon kaj ĝin instrui laŭ ĝusta maniero (ĉar ankaŭ pro manko de bona instrumetodo perdiĝas pluraj kursanoj), sed kiu devas ankaŭ montri kaj havigi al siaj lernantoj la eblojn por utiligi Esperanton al iliaj diversaj aspiroj. Jen grava, sed malfacila tasko! Tamen ĝi estas necesa por ke malgrandiĝu la malsaniga influo de kursan-perdiĝo. Konklude, la kursgvidanto havas la devon daŭre serĉi por siaj kursanoj la ilojn, laŭ kiuj ili povas utiligi Esperanton por siaj diferencaj aspiroj. Preskaŭ ĉiu lernanto havas plurajn ŝatojn, el kiuj la gvidanto devas atenti pri kiel eble plej multaj. En niaj F.L.E.-kursoj sendube la plej forta aspiro estas ĝenerale la socialisma idealo. La instruanto bone priatentu tiun aspiron! Sed li devas ankaŭ trovi (por povi havigi al siaj lernantoj la praktikeblojn) la aliajn, malpli fortajn aspirojn de siaj lernantoj. La plej favora maniero estas la persona kontakto kun ĉiu sia kursano. Ne nur unu fojon en la komenco de la kurso, sed daŭre dum la tuta kurso (kaj eĉ post ĝi), ĉar la interesiĝoj, la vidpunktoj kaj la cirkonstancoj ĉe ĉiu lernanto estas subjekto de ŝanĝiĝo. Tial mi forte rekomendas al ĉiu kursgvidanto: okupu vin plejeble pri la diversspecaj aspiroj de viaj lernantoj, metante Esperanton je la servo de tiuj aspiroj, por ke jam dum la kurso Esperanto fariĝu por ili utila ilo, por la uzo kaj la realiĝo de iliaj ŝatoj kaj idealoj.

M. Leereveld.

RECENZO.

La Virineto en bluo kaj aliaj rakontoj, originale verkitaj de Mason Suttard. Eld. The Esperanto Publishing Company Ltd. Rickmansworth. Herts. Anglujo (Epoko-Serio).

Dek tri mallongaj rakontoj nepretendantaj esti alta literaturo. Agrabla distra legaĵo en flua, ne malfacila lingvaĵo.

Lingvaj makuletoj ne mankas, sed ili ne ŝtampas la verketon malbona. Pro tio mi mencias nur unu, la plej gravan (p. 35): Tuj kiam li vidas ilin, li *flirtas* la manon. p. 66: Per poŝtuko ŝi signis al li kaj li ridete reciproke *flirtis* la manon (= svingis).

Cetere leginda.

F.F.



MEDEDELINGEN BONDSBESTUUR

Voorstellen

voor ons bondscongres dienen vóór 1 Febr. in het bezit te zijn van den secretaris: Postbus 8002, A'damW.

Bestuursverkiezing.

Het bondsbestuur stelt zich herkiesbaar. Candidaten voor het bestuur dienen voor 1 Maart a.s. te worden opgegeven aan het secretariaat.
Ons bestuurslid k-do A. v. Haren, wordt door het bestuur aanbevolen als voorzitter voor onze bond. K-do Faulhaber, die tijdelijk het voorzitterschap waarneemt, blijft als ere-voorzitter en in zijn diverse functies geregeld contact met onze organisatie onderhouden.

Vacature F. de Vries.

K-do P. G. v. d. Plank werd door het district Amsterdam in ons bestuur gekozen ter voorziening in de vacature.

Nieuwe Afdelingen.

Een nieuwe afdeling is te Gorinchem opgericht; secr. k-dino Havenstroom-Bonarius, W. de Vries Robbéweg 53 en te Zutphen: secr. H.J.Kemperman, Dieserstraat 6.

Radio.

Op Zaterdag 4 Jan. a.s. 16.10—16.25 spreekt k-do W. Slotegraaf over: Hoe staat het met Esperanto in het buitenland? In Februari spreekt k-do A. v. Haren over ons Paascongres.

Contributie F.L.E.-Amikaro

moet worden overgemaakt aan den bondspenningmeester, Postgiro no. 331133 of per postwissel aan Postbus 8002, Amsterdam-W.

Statistiko.

K-do de Vries pretigis statistikon el la materialo kiun li ricevis kaŭze de niaj demandlistoj de julio 1946. Nur 54 sekcioj kaj 6 distriktoj resendis la demandlistojn. Ĉar 33 sekcioj kaj 4 distriktoj ne respondis, ni opinias la statistikon ne valora por publikigo. Kaŭzis tiun domaĝon supre menciitaj 33 sekcioj kaj 4 distriktoj. Ili kulpas pri perdo de tempo kaj energio de nia estraro kaj la bonvolaj sekcioj kaj distriktoj.

Informo de la Redaktoro.

Ni sukcesis atingi ĉe la presisto, ke L.E. ĉiam aperas akurate kaj sufiĉe frue, por esti en la komenco de ĉiu monato ĉe la membroj. Kondiĉo estas, ke la manuskriptoj estu antaŭ la 15a de la monato ĉe la presisto aŭ eĉ pli frue. Kio venas pli malfrue riskas esti ne-enpresata. Ja perdiĝas pluraj vesperoj de korektado, reviziado k.t.p., dum la presejo havas tro da laboroj. La ensendintoj de malklare skribitaj esp.-artikoletoj kaŭzas multajn korektojn, ĉar en la presejo ne plu estas esperantaj kompostistoj. Ofte venis tro malfrue sekcio-informoj, kiuj facile povus esti senditaj unu aŭ du semajnoj pli frue. Alsendo al la administrejo kaŭzas prokraston aŭ malfruiĝon, ĉar ĝi denove devas ekspedi la ajojn por L.E. al la redaktoro, plurfoje post plenumo de la mendoj aŭ petoj sur la sama folio. Cetere: ne skribu sur ambaŭ flankoj de la papero.

H.W.A.

GAZETARSERVO

Ankaŭ el la eksterlando ni ricevis eltondaĵojn el la jenaj gazetoj;

Ce Soir, Brussel; La Derniere Heure, Brussel, 2 ×; Het Handelsblad, Antwerpen 2 ×; La Gazette de Liege, Luik; Le Matin, Antwerpen; La Meuse, Luik; La Nation Belge, Brussel; De Nieuwe Gazet, Brussel; De Nieuwe Standaard, Antwerpen; Ons Volk, Brussel; De Roode Vaan, Brussel 2 ×; De Volkswil, Gent; Norrköpings Tidningar, Svedio; Social-Demokraten, Danio, kelfoje; Filmagazine, Lyon, Francio; Der Naturfreund, Zürich; La Jeunesse, Parizo, kelfoje.
La semajna gazeto Paraat akceptis tradukitan artikolon el Sennaciulo kaj informon el Sud Hungarlanda Stelo kaj restas preta akcepti tiun materialon por ĝi taŭga.
La 16an de aŭg. aperis en ĝi „La situacio en Bulgario". De Tempelier enhavas ekde 31 aŭg. elementan kurson. Jam kun kelkaj landoj ni interŝanĝas gazetojn kaj eltondaĵojn.

KOMITATO „POR NIA PREZIDINTO".

Karaj Sekciaj Estraroj.

Baldaŭ la komitato finos sian taskon. Ĝi jam kontaktis kun fakulo, kaj kun la reprezentanto de la Asocia estraro ĝi finaranĝos la tuton. Ĉar eble en iuj sekcioj oni ankoraŭ ne findecidis pri la mondonaco, ni volonte ankoraŭ donas al ili la okazon oferi iom tiucele. Tamen ni ne eterne povas atendi.
1947 ĝi ne plu kalkulos pri monsendoj. Al la sekciaj kasistoj, kiuj ne jam sendis la disponigitan sumon al la Ĝironum. Z 1078 de „La Grupo Zamenhofa" Sekc. A'dam 5 de As. de Lab. Esp. aŭ al k-do B. Bultemeijer, Jan v. Galenstraat 86[1], Amsterdam-W. (Menciu „Por nia Prezidinto") ĝi petas ne plu prokrasti tion.

P. Lamfers, sekr.



EL LA DISTRIKTOJ

AMSTERDAM: Sekr.: P. Aertszstr. 83.

Vendredvesperon *17 Jan.* parolado de André Wendt, pri Germanio en „de Leeuw", Valkenburgerstr. 149. Enirkartoj 40 cendoj ĉe via sekcio.

UTRECHT.

Sekr.: Burgem. Patijnlaan 158, Zeist.

La 17an de Novembro la distikto aranĝis prelegon en Amersfoort, kie paroladis la asocia sekretario, k-do Kruit. Tre klare li pritraktis por ni la kursgvidadon.
La estraro vere hontas, ke nur 17 anoj el la tuta distrikto ĉeestis. Ni havas pl.m. 120 gemembrojn, do vi komprenos, ke tiel ni ne povas daŭrigi. Gekamaradoj, tio ne povas daŭri. Ni bezonas la helpon de ĉiu, se ni volas atingi ion.

H. Hazeleger.



EL LA SEKCIOJ

AMSTERDAM II „Ni volas Lumen".

Sekr.: Tuinbouwstraat 140, Oost.

La 12an de Dec. ni aranĝis Zamenhofvesperon. Krom la membroj ĉeestis edzinoj kaj kursanoj. Multaj el niaj membroj kunlaboris. Post komuna kantado el „Ni Kantu", iu k-do voĉlegis Esp. poemojn. Kantistino aŭdigis belajn Esp. kantojn kaj sekvis deklamado de prozo kaj poezio Nederl. lingve. Post la paŭzo oni voĉlegis kortuŝan ĉapitron pri D-ro Z. el la Nederlanda traduko de la historio de Esp., de E. Privat. Fine komuna kantado kaj kelkaj aliaj programeroj. En ĉi familia festo ni multe kontribuis al la Esperanto-eduko, ankaŭ de la ne-esperantista parto de la vizitantoj. Proksiman jaron nia klubo festos sian dudekjaran ekziston.

ARNHEM: Sekr.: Schuttersbergweg 61.

Nia sekcio malrapide sed tamen kreskas. La nombro de anoj nun estas 45. Nia propagando rezultis elementan kurson de 13 plenkreskuloj, kaj infankurson kun 6 knabinoj (12 jaraĝuloj). Plue ni havas A-kurson gvidata de k-do Arends kun 6 partoprenantoj; 2 aliaj k-doj studas por akiri la B-diplomon.
Pri la vizitado al niaj grupvesperoj ni estas kontentaj; ĝenerale ĉeestas 22—25 gekamaradoj. La 16an de Dec. ni okazigis en kunlaboro kun L.E.E.N. la Zamenhofvesperon.
La sekcia kanthoro kaj teatrajgrupo prezentis ion dum tiu vespero.

J. A. Lubber, sekr.

GOUDA „Konkorde Antaŭen".

La 12an de Novembro. K-do G. Kalkman, Prez. de la distrikto Sud-Holando, pritraktis „La literaturo en Esperanto". Ni dankas k-don Kalkman pro la agrabla kaj lerniga vespero, la sekcian estraron pro ĝia iniciativo okazigi ĉiumonate publikan kun venon.
La dua kunveno okazis la 19an de Decembro memore al la naskiĝdato de d-ro Zamenhof. Oratoro estis k-do J. v. Scheepen el Hago, kiu parolis pri „La vivo de d-ro Zamenhof kaj la signifo de la interna ideo". K-do F. S. Vermeulen deklamis kelkajn poemojn de d-ro Zamenhof.
La tria kunveno okazos *la 16an de Januaro* 1947a vespere je la 7.30a horo en nia salono. K-do C. van Essen parolados pri „La signifo Gek-doj vizitu ĉi tiun gravan kunvenon kaj kunportu vian kantaron!

P. Roos, Sekr.

LEEUWARDEN: Sekr.: Marnixstraat 19.

La Sanktulo kaj lia nigra servisto ankaŭ vizitis nian klubkunvenon, je la 6a de Dec. La prezidanto, la sekretario kaj la kastisto ricevis malgrandan donacon kun la kutima Sta Nikolao-rimo.
La kasisto ricevis f 10.— por la kaso. La 3 kursgvidantinoj kaj kamaradino de Vries aranĝis la aferon, pri kiu neniu sciis.
Ni komune kantis: „Jam ridetas lun'al tero" kaj „El lando Hispana veturis al ni" (La sanktulo mem kunportis la kantojn) kaj ĉiu ricevis bongustaĵojn kaj kafon. Estis tre amuza vespero. La elementa kurso komenciĝis kun 26 partoprenantoj kaj estas gvidata de k-dino Rijpstra—Timmermans.
La infankursoj estas gvidataj de la k-dinoj. IJm Hemkes—Hoff, T. Brinkman kaj C. C. M. Rijpstra—Timmermans. IJm Hemkes—Hoff gvidas ankaŭ la kurson por progresantoj kaj Tjepkema, nia prez., gvidas la B-kurson. Por la elementa kurso mi uzas „Facile lerni esperanton" laŭ mi tre taŭgaj La 16an de Dec. ni festis kun la Frisa Esp. Rondo la Zamenhofan Memortagon.

C. C. M. Rijpstra—Timmermans.

ZAANDAM „Antaŭen".

Sekr.: Emmastraat 28.

Jarkunveno *3 Jan.* en hotelo Reitsma, Westzijde 22, je la 8a horo. Neniu forrestu!

La 14an de Decembro, mortis post longa malsano
K-ino A. E. BROEKHUIZEN
en la aĝo de 51 jaroj.
La Estraro de Sekcio Zuidlaren.

★ S.A.T.-KOLONO

Unue mi ĉi foje direktas min al la pli ol mil membroj de S.A.T. en Nederlando, ĉar la nova jaro alportas al vi la devon pagi vian tutjaran kotizon por la Asocio. Ne prokrastu, ĉar ni tre bezonas vian financan kontribuajon. Ankoraŭ la kotizoj en aliaj landoj estas blokitaj, do ni en Nederlando devas pagi tre grandparte la plej gravajn elspezojn de S.A.T. En la pasinta jaro ni tre bone sukcesis en tio, ĉar la Asocio povis regule liveri al proksimume 3000 membroj la monatan gazeton. Ke tiu gazeto aperis nur kun ses paĝoj anstataŭ kun ok aŭ eĉ kun ankoraŭ pli da, pri tio, grandparte, kulpas la papermanko. Ni do multe faris por nia tutmonda Asocio, kiu bedaŭrinde en multaj landoj estas tre malbone reprezentata, ne pro tio ke oni ne ŝatas nian Asocion, sed simple ĉar la esperantismo ĝenerale kaj la laborista esperantismo aparte ankoraŭ estas plorinde malfortaj. Pri tio vi konsciu, kaj ni esperas, ke vi per tiu konscio ankoraŭ pli multe faros por S.A.T. ol antaŭe kaj ke vi nun baldaŭ renovigos vian membrecon. Al tiuj k-doj, kiuj en januaro ankoraŭ nenion estos pagintaj, ni ne povas sendi la organon.
Atentu ke *la jara kotizo nun estas 3 guldenoj*. Do tre malgranda plialtiĝo, kiu pro la plialtiĝo de la poŝta tarifo jam parte senvaloriĝis por ni. Eble vi ĉi jare ankaŭ ricevos plenan jarlibron kaj atentu, ke vi rajtas unufoje anonci en la organo pri korespondado aŭ io simila.
Bonvolu do plenumi vian devon al S.A.T. Pagu al via sekcia peranto, kiu nun kompreneble lasas neniun en paco antaŭ ol la kotizo, aŭ parto de ĝi, estas en lia poŝo. Jes, grandparte ĉio dependas de la perantoj, ankaŭ ĉu la tuta klubanaro konsistas el S.A.T.-anoj!
Tiuj kiuj kutimas pagi rekte al S.A.T. sendu Essen, Floretstr. 10, Rotterdam-Z. Mia voko ne estu voko en la dezerto!
Kaj nun vi, F.L.E.-ano, kiu ankoraŭ ne estas ligita al niaj samideanoj de ekster la limoj. Ho, eble vi pensas: ĉu Esperanto ne jam ligas min al ili? Ne, Esperanto sen organizoj, per kiuj la Esperantistoj interkontaktiĝas, ne multe utilas al ni. Via membreco al F.L.E. ligas vin nur al la k-doj, kiuj loĝas en unu lingva regiono. Sed S.A.T. estas la aŭtentika Asocio por ĉiuj progresemaj Esperantistoj kie ajn ili loĝas. Ĝia ĉefa celo estas, interligi la esp-istojn kaj doni al ili la okazon praktiki la lingvon. Ĝi do kreas por ni mondon esperantistan, sen kiu la lernado de la lingvo havus nenian valoron praktikan. Tial ankaŭ via loko devus esti en S.A.T.!
Prenu decidon! Ne pli longe hezitu! Aliĝu nun al S.A.T.! B. Wels.

SAT-RONDOJ

AMERSFOORT.

Dimanĉe la 24an de Novembro, okazis kunveno, ĉe k-do Mater. Ĉeestis 8 anoj. Ni priparolis diversajn aferojn i.a. leteron el Parizo. Nia rondo nun nombras 19 membrojn.
S. v. Houten.

ARNHEM.

Kotizo: Mi petas al la anoj baldaŭ pagi sian kotizon por 1947a, entute f 3.50, eventuale pagebla en partoj. La loka S.A.T.-peranto:
A. Henstra, Taklaan 5, Arnhem.

GOUDA.

Nia rondo nun nombras 20 anojn.
Jaŭd-vespere la *23an de Jan. 1947*, je la 7.30 horo en la lerneja salono, Groeneweg, parolos k-do C. v. Essen, la kasisto de S.A.T. el Rotterdamo, pri la temo „La signifo de S.A.T. kaj la aliaj unuiĝoj". Ĉiu nepre ĉeestu en ĉi tiu grava kunveno. La peranto.

ROTTERDAM.

Ni invitas niajn membrojn al nia unua S.A.T.-kunveno en la nova paro. Kun plezuro ni sciigas al vi, ke ĉi foje parolados k-dino Prent—Moon. Temo: Renovigo de edukado en Anglio kaj Nederlando.
Dato: *la 5an de jan.* Loko: Zuider Volkshuis, Brink.
Ni komencas precize je la 10.30. Venu frue se vi deziras sidlokon.

ALG. NED. ESP. EXAMEN-COMMISSIE.

Uitslagen der esperanto-examens te Utrecht op 26 October 1946.

Aangemeld voor examen B 17 candidaten, opgekomen 15, geslaagd 11: M. Leereveld te Blaricum, W. J. L. Cramer en H. Jurriaans—Slinger te Bussum, J. G. Westphal—Noordam te Eindhoven, E. Burgler—Jezsó te Geleen, M. E. Nawijn te Den Haag, G. Gerlofs, J. M. H. v. d. Horst en A. H. Ch. Kwantes—Munnik te Haarlem, P J. H. Ramaekers te Heemstede en W. J. H. Derks te Tilburg.
Aangemeld voor examen A: 69 candidaten, opgekomen 65, geslaagd 46: R. L. Hoogendoorn te Almelo, P. J. Visser te Amersfoort, H. Huitenga, E. Marsman en B. v. d. Rest te Amsterdam, W. Spaander te Andijk, E. v. d. Berg en T. M. Smid te Arnhem, E. Stel te Assen, E. J. M. v. Elzakker, E. P. Gieles en Th. J. Gieles te Bergen op Zoom, J. E. Meyer en C. v. Wijngaarden—Kartman te Beverwijk, H. M. Bekkers—Scholten te Bilthoven, J. Bosschaart en S. P. A. v. Gils te Breda, J. Ph. Aret, A. Dijkstra, P. v. d. Star en W. Wijkhuizen te Gouda, A. J. A. M. Pulles te Grave, P. W. Welters te Groningen, F. W. Bédier de Prairie, C. J. Belinfante—Hoyer, A. Hamers, P. A. Jansen en H. Valckenier te Den Haag, K. Wouda te Haarlem, K. Dijkstra te Leeuwarden, Ch. Ph. Rozier te Leiden, H. M. de Lange—v. Woensel te Nuth (L.), D. A. W. Henskes te Overveen, G. J. J. M. v. Keulen, M. Stoffels en L. J. Vermaas te Rotterdam, M. Hof te Scheveningen, C. Booy te Starnmeer (N.H.), H. H. Cleerdin, H. A. v. Dijk, P. Havers, M. Th. v. Kortenhof en G. C. de Vos te Utrecht, W. J. v. d. Bosse te Vlaardingen, M. B. Duyvis en A. Roosing Sr. te Zeist.

INGEZONDEN.

Gemengde gevoelens en sterke geïndigneerde gemoedsgesteldheid, welke mij thans bezielen, zijn voor mij aanleiding, scherp stelling te nemen tegenover den heer Sam de Wolff, die in de uitzending van Radiolympus, d.d. 8 Dec., voorbereid door de V.A.R.A., blijk heeft gegeven van onvoldoende kennis inzake het groeiproces van Esperanto.
De heer de Wolff, die in de eerste plaats een subjectief oordeel gaf, waarmee de vraagsteller niet gebaat was, doch tevens zijn toevlucht zocht in een digressie, waardoor een categorisch antwoord achterwege bleef en zijn irrelevante zienswijze dit hiaat aanvulde, was de mening toegedaan, dat een kunstmatige taal als Esperanto, zijn beslag als wereldhulptaal nimmer zou krijgen.
Deze opvatting, die ik gelukkig niet met den heer de Wolff deel, getuigt, in weerwil van de steeds urgenter gevoelde behoefte aan Esperanto als wereldhulptaal, zowel in intelectuele, als in middenstands- en arbeiderskringen, niet slechts van onwetendheid, maar maakt tevens onze idealen tot een aanfluiting, hetgeen wij niet kunnen tolereren.
Dat bij iemand, als de heer de Wolff, een dergelijke mening heeft post gevat, kunnen wij niet anders dan betreuren.
Ik ben er zeker van, dat het oordeel van den heer de Wolff bij ons, Esperantisten, geen afbreuk aan ons enthousiasme, te strijden voor Esperanto, zal hebben gedaan, doch integendeel, ons gesterkt zal hebben in onze wil, Esperanto bij alle lagen der bevolking ingang te doen vinden.
M. v. d. Brink.

LIBRO-SERVO

Krom la verkoj menciitaj en L. E. de Decembro ni povas liveri:

Mi serĉis oron kaj oleon, D. Hood	f 4.50
Sveda Antologio (broŝ.)	f 6.60
Murdo en la Orient-Ekspreso, A. Christie	f 1.—
La knaboj de Paŭlo-strato, A. Molnár	f 1.—
La Princo kaj Betty, P. G. Wodehouse	f 1.—
La Tempo-maŝino, H. G. Wells	f 1.—
Princino de Marso, E. Rice Burroughs	f 1.—
Colomba, P. Mérimée	f 1.—
Sep vangofrapoj, K. Aszlányi	f 1.95
La Virineto en Bluo, M. Stuttard	f 1.95
La Forto de l'Vero, Adi	f 1.65

Voor propagandadoeleinden beschikken wij over:

Vorderingen	f 0.03
Richtlijnen v. h. onderwijs v. Esperanto op de school (een nieuwe brochure van het Bureau Esperanto bij het Onderwijs)	f 0.05
voor afd.	f 0.04
Esperanto juist nu (2e uitgave)	f 0.05
Wat zeggen zij over Esperanto?	f 0.02

Bij vooruitbetaling per giro s.v.p. de bestelling afzonderlijk per brief of briefkaart opgeven, ter voorkoming van vertraging en abuizen.

★ ANONCOJ

DUFRATASOCIO.

Reprezentado Rua Senador Feijó, 29-s/407. SAO PAULO — BRAZILO
Deziras vendi ĉiuspecajn varojn en Brazilo.

—

K-do Ion Bunesku, deziras korespondi pri ĉiuj temoj. Adreso: Str. P. N. 488, Parcul Vatra Luminoasa, Bucuresti, Rumanio.

Nedelea N. Vlad, Sekretario de G. E. M. Strata Nieulal Iorga No. 16 Bukureŝto, Rumanio. Pri ĉiuj temoj.

Oni bezonas gekorespondantojn por lernintoj. F-ino Paquita Martin, Suipacha 727, Rosario, Argentino.

K-do J. Kruta, Skoda-Modelarna, Plzen, Ĉeĥo-Slovakis serĉas la adreson de k-do Wisner.

—

LA VERDA FLAMO.

„Monata Revuo por ĉiuj".
Varia artikolaro, instrua, distra kaj informa. Kunlaborantoj en 5 mondpartoj.
Abonkotizo: 3 ned. guld. aŭ egalvaloro en bonaj Esperanto-libroj aŭ 15 internaciaj poŝtaj respondkuponoj.
Redakcia adreso: Casablanca, Maroko, Place Mermoz (Imm. Chicot).
Abonoj akcepteblaj ankaŭ ĉe la adm. de „Laborista Esperantisto".

JUNULARKOMITATO.

Sekr.: Langereis A 31, Hoogwoud.
La unuaj paŝoj estas faritaj; nia laboro jam komencis. La 14an kaj 15an de Decembro okazis nia unua festa renkontiĝo en la junulargastejo Jan Geyzen, Haarlem, por la distr. Nord-Sud-Holando kaj Utreĥto, kiel provo. Ĉar la anoncojn kiujn ni ricevis kaŭze de nia alvoko estas ankoraŭ nombreblaj.
Pro tio: hezitu ne pli longe sed sendu vian anoncon. Tiam ni scias, ke ni povas kalkuli ankaŭ je vi kaj ke ni povas aranĝi semajnfinojn en aliaj distriktoj. LA CELO de nia komitato estas: pli agrabligi por la junuloj la anecon de nia Asocio. Kaj ne forgesu: Kotizon vi ne bezonas pagi! Nur la partoprenkostojn de la kunvenoj, — por kio ni enkondukos ŝparsistemon. Do sendu vian adreson kaj ni respondas! „JUKO".